Universala Esperanto-Asocio

UNIVERSALA KONGRESO
KLERIGA LUNDO
Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2018-17 sendita el Budapeŝto, la 28an de junio.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# TAGO por via KONGRESA NOTLIBRO!

La sesioj de la Kleriga Lundo okazos en la 30a de julio en tri tempoblokoj kaj kvin salonoj. Vi povos jam nun elekti viajn preferatajn temojn!

### *La horoj:*

1a bloko: 9.00- 10.30
2a bloko: 10.45- 12.15
3a bloko: 12.30- 14.00

### *La salonoj kaj la sesioj:*

## Salono A

### 1. Mireille Grosjean: Aikido

Per karesoj konvinki la atakanton ne ataki. Jen Aikido, senperforta luktarto el Japanio. Aikido ne aperas kadre de la olimpiaj ludoj. La praktikado de Aikido estas saniga por la korpo kaj gvidas al memkono, memregado, memrespekto kaj harmoniaj kontaktoj kun la aliaj. Mirejo prezentos la historiajn rilatojn inter Aikido, Esperanto kaj Oomoto en Japanio (Power Point). Poste ŝi montros kelkajn praktikajn ekzercojn ne el la sindefenda parto de la arto, sed por sperti la bazan principon (tiel nomataj „Ki-ekzercoj“). Ŝi prezentos ankaŭ facilajn teknikojn sendanĝerajn. En la dua kaj tria partoj ĉiuj rajtos partopreni.

# KLERIGA LUNDO

### 2. HORI Jasuo

### Prezentado pri Japanio

Komence ni deklamu hajkojn verkitajn de suferantoj de la nuklea katastrofo en Fukuŝima. Kaj poste okazu prezentado de amuzaĵoj: 1. Paperfalda teatraĵo "Postulema edzino" 2. Esperanto-bingo 3. Fingroludoj. Ni ĉiuj kune ĝuu la deklamadon kaj prezentadon. Se vi lernos ilin, vi estos heroo en Gaja Vespero en via Esperanto-klubo.

### 3. HORI Jasuo kaj Sylvain Lelarge

### Nekutimaj objektoj el la mondo

Laŭ landoj oni havas diversajn objektojn kaj ilojn ne kutimajn al homoj en aliaj landoj. Unue HORI faros koncerteton per nekutimaj muzikiloj el la mondo, kaj poste partoprenantoj montros nekutimajn objektojn el sia lando. Vi certe scios vastecon kaj abundecon de la mondo per tiuj aĵoj.



## Salono B

### 1.Tatjana Auderskaja

### Amuzaj intelektaj ludoj

Esperanto postulas intelekton por povi krei kaj kompreni novajn vortojn. Ĝi estas "Granda Intelekta Ludo", se konsideri, ke la baza ĝia principo ĝuste kongruas kun infana ludo "kubetoj", kiam el diversaj kubetoj (prefiksoj, radikoj, sufiksoj) oni kunmetas novajn... ĉu vortojn, ĉu bildojn, ĉu domojn. Do, ĉiu esperantisto, uzante nian lingvon, ludas. Kaj ludante li amuziĝas, ricevas ĝojon.

Ni proponos kelkajn amuzajn ludojn, de literaj ĝis tekstaj kaj eĉ poeziaj. Bonvenon al tiu vastega mondo de mensotrejnaj taskoj !

### 2. Ana Montesinos

### Klerigaj Ludoj en Kleriga Lundo

Venu al "Klerigaj ludoj dum Kleriga lundo" por kunvojaĝi tra diversaj landoj de la mondo per iliaj gastronomioj: iliaj ĉiutagaj kaj festo-tagaj pladoj, iliaj tradiciaj manĝkutimoj kaj manĝilaroj, ktp. Kunportu, se vi volas, recepton el via lando, (kaj eĉ manĝetojn, por ke ni gustumu ilin kune!)

### 3. Humphrey Tonkin

### La arto paroli publike

Oratorado havas longan historion en la Esperanto-movado, ekde la Zamenhofa parolado en Boulogne-sur-Mer. Ni ja estas lingva movado, kaj montri la kapablon de la lingvo estas grava elemento en ĝia disvastigo. Publike argumenti por ĝia akcepto estas ankaŭ grava elemento en la armilaro de niaj pacaj batalantoj. La mansvingado kaj aktorado de la epoko antaŭ laŭtparoliloj kaj antaŭ radio, televido kaj interreto tamen nun plejparte finiĝis: hodiaŭ ni bezonas pli subtilan, pli personan aliron al argumentado. En tiu ĉi seminario ni celos esplori tiun novan arton de publika parolado.

## Salono C

### 1. Johan Derks

### La problemo de komunikado inter esperantistoj

La « fina venko » ne estas afero nur de kvanto. Kreskopovo dependas de kvalito de lingvo. Sed lingvo estas rimedo por efika komunikado. Parolanto volas atingi ion per siaj vortoj kaj tial aliaj observas ĝiajn "paralingvajn simptomojn": Ĉu ĝi estas serioza en tio kion ĝi asertas? ktp. Bedaŭrinde, ricevante retmesaĝojn kiuj enhavas pli ol simplan informon ni ne povas rigardi la korpan lingvon, la voĉlaŭtecon ktp. Sed restas aliaj kriterioj en mesaĝoj kiuj determinas la efikecon de niaj « parolagoj »: ekzemple valideco, vizaĝprotekto, kunlaboremo.

Se tiuj kriterioj ne estas plenumataj, kiel ni reagu por « savi » la komunikadon? En reala mondo tamen estas multe da malĝentileco, pri kiu ni ankaŭ devas kritiki nin mem. Komenci debaton kun forta konvinko pretervidas, ke ni devas esti malfermaj al aliaj vidpunktoj. Tio necesigas ke ni sentas ankaŭ iom da dubo.

Ankaŭ nia debatstilo kaj respekto al konvencioj determinas la rezulton de niaj debatoj. Fine ni devas akcepti nekontentigajn rezultojn pro malsamaj kulturaj fonoj, vivospertoj kaj klerecoj, kion debatsciencistoj nomas la "kognaj ĉirkaŭaĵoj". Ideale ni devus formi "lernantan komunumon », interalie en retdiskutlistoj.

### 2. Peter Baláž

### Plej freŝaj aktivecoj de E@I en la kampo de edukado

E@I ekde sia komenco antaŭenigadas edukadon diversmaniere kaj diversforme - retejoj, aranĝoj, eldonaĵoj, kampanjoj... En la nuna momento venas tempo por eĉ pli da aktivecoj en tiu ĉi kampo kun plia profesiiĝo, oficiala rekonado kaj pli vasta kunlaboro. Prezentitaj estos la plej freŝaj atingoj kaj la plej aktualaj edukaj projektoj.

### 3. Peter Baláž

### Moderna edukado kaj nuna mondo – ĉu tempo por ŝanĝo de paradigmoj?

Paradigmo estas laŭdifine: aro de principoj aŭ ideoj karakterizantaj la pensadon en iu scienco en difinita tempo. Ĉu nun, en la tempo de profundaj krizoj (ekologiaj, ekonomiaj, sociaj ktp.) eble jam venas tempo por nepre bezonataj ŝanĝoj de la ĝisnunaj paradigmoj en la eduka sistemo? Aŭ ĉu efektive ni bezonus tute novajn paradigmojn en ĉiuj vivo-sferoj? Ĉu la mondo (kaj ni ĉiuj) pretas por tio?

## Salono D

### 1. Mag. Bernhard Tuider

### La Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Historio, havaĵo kaj projektoj

La Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj – fonditaj en 1927 kiel Internacia Esperantomuzeo – fariĝis en sia pli ol naŭdekjara kolekta laboro la plej ampleksa fakbiblioteko por Esperanto kaj interlingvistiko. La instituto ne estas nur biblioteko kaj muzeo, sed ekde la fondo ankaŭ kolektas diversspecajn arkivaĵojn de gravaj personoj kaj institucioj en la vasta kampo de interlingvistiko. La prelego donas superrigardon pri la historio, la havaĵoj kaj celoj de la Esperantomuzeo kaj de la Kolekto por Planlingvoj. Krome

de tio la aktualaj projektoj pri katalogado, ciferecigo (libroj, periodaĵoj, sonbendoj, fotoj, bildpoŝtkartoj, afiŝoj) kaj konservado estas prezentitaj same kiel la konstanta ekspozicio, la eventoj kaj la atelieroj de la Esperantomuzeo.

## 2. Francesco Maurelli

## "Erasmus+ : malkovru eblecojn financi vian agadon".

### Erasmus+ : malkovru eblecojn financi vian agadon

Ĉu vi havas ideon pri realiginda projekto, sed ne havas la rimedojn por ĝin realigi? Ĉu vi ŝatus ricevi subvenciojn por via Esperanto-agado? Ĉu vi volas helpi vian organizon plifortiĝi? Ne maltrafu tiun ĉi programeron. Ĝi gvidos vin tra la malhelaj tuneloj de la Eŭropuniaj subvencirimedoj, por doni al vi bazan ilaron por sukcese verki projektproponojn. Sukcesaj spertoj estos prezentitaj kiel konkretaj ekzemploj de subvencieblaj agadoj.
La gvidanto estas kunfondinto kaj direktoro de Kosmo Strategio Ltd., profesia entrepreno kiu specialiĝas pri eŭropuniaj subvencirimedoj por Esperanto-organizoj.

## 3. Kajto

## Kun-Kant-Kanonado: kant-ateliero kun Ankie kaj Nanne de Kajto

Kanono-farado estas nia hobio. Tiujn humurajn miniaturojn kanti ni ŝatas, kaj laŭte kaj softe. Kanono-fabrikado estas aliula profesio. Sed domaĝe ties kanonoj sonas alimaniere ol la niaj, ankoraŭ ĉiam pli ofte. Ŝanĝu tion!



Dum la UK en Lisbono, Kajto povos prizorgi ankoraŭfoje kant-atelieron en kiu la plej grava estas la kant-plezuro.  Ĉiuj estas bonvenaj por partopreni, ankaŭ tiuj kiuj pensas, ke ili ne povas kanti.

Sub la inspira gvido de Ankie kaj Nanne la partoprenantoj estos invitataj pasie kunkanti la gajajn, la melankoliajn, la komikajn, la profundsencajn kanonojn kaj refrenojn.

Ankaŭ kelkaj kantoj povus esti preparataj por prezentado al publiko pli malfrue dum la semajno je neatendita momento en neatendita loko.

La publiko estos invitata por partopreni unu aŭ du aŭ pli da fojoj en la 'Kajto Kun-Kant-Kanonado'-kant-ateliero por helpi superbrui tiujn aliajn kanonojn kaj finfine silentigi ilin.

## Salono E

## 1. Ana Ribeiro

### Nova reta membrospaco de UEA

UEA kreis novan manieron por interagi kun siaj membroj, tra la retejo membro.uea.org, kie membroj povas facile trovi ilojn kiuj utilos por ilia agado. Dum tiu sesio de Kleriga Lundo, vi aŭskultos planojn por tiu retejo (same kiel pri la proponata retmembreca sistemo) kaj ankaŭ ricevos helpon pri kiel plej efike uzi ĝin.

## 2. Stefan MacGill **kaj panelo de praktikantaj artistoj diverskampaj**

### La artoj serve al Esperanto -- Esperanto serve al la artoj

*La artoj serve al Esperanto*

1. La nuna kultura sceno en Esperantujo.
2. La rolo de Universalaj Kongresoj en stimulo de la artoj.
3. La roloj de kulturaj festivaloj kaj aliaj renkontiĝoj.
4. Perspektivoj kaj defioj por artistoj en Esperantujo.
5. La malfacilaĵoj specife por la teatra arto.
6. La rolo de la parolaj artoj kontraste al neparolaj.

*Esperanto serve al la artoj*

1. La reputacio de Esperanto en artismaj rondoj.
2. Esperanto kiel pontolingvo por literaturo kaj aliaj artoj.
3. Sukcesaj iniciatoj tra la lastaj jaroj.
4. Kulturaj eksteraj rilatoj por esperantistoj.
5. Favoraj kondiĉoj por tia kunlaboro.
6. Subvenciaj ebloj por arta agado en aŭ pere de Esperanto.

## 3. **Johannes & Eva — punkto.info**

### Dancu kvazaŭ neniu rigardas

### *Kial kaj kiel havi kaj flegi publikan identecon Esperantlingvan*

Spertaj Esperantistoj aprezas buntecon en la Esperanto-movado. En ĉiaj kulturaj, ĉiaj religiaj kaj ĉiaj politikaj sferoj, en ĉiaj fakoj, en ĉiaj ŝatokupoj ekzistas esperantistoj kiuj povas per siaj specialaj kapabloj, scioj kaj spertoj kontribui al la movado. Ĉu povas aŭ ĉu povus? Se oni traserĉas Interreton oni ne trovas tiom multe tiun buntecon. Estas kelkaj laŭdindaj ekzemploj kiel "Scivolemo" [1], "Egalecen" [2] kaj "Teo kaj Libroj" [3] por nur nomi tri, sed povus esti multe pli. Eble por multaj kapablaj esperantistoj estas obstaklo starigi kaj flegi sian publikan identecon, ĉar tio postulas kroman sperton krom la jam ekzistantaj.

Nia prelego celas montri eblojn publike tutmonde agadi por kontribui al la diverseco de la Esperanto-movado. Ni komencas per tre facilaj ebloj, kiuj permesas starigi sian propran retejon per kelkaj klakoj por komencantoj. Ni daŭrigas pri la pli postulaj ebloj ekhavi sian propran domajnnomon ĝis la tre ambicia sed plej profesia kaj libera rimedo de propra servilo.

Apud la ebloj publikigi enhavojn ni kovras ankaŭ la manierojn atentigi pri sia agado per la kutimaj sociaj retoj kaj donas konsilojn kiel strukturigi la enhavon de oniaj publikaĵoj.

---

[1]: https://scivolemo.wordpress.com/
[2]: https://egalecen.org/
[3]: https://teokajlibroj.wordpress.com/

**Vortoj: 1487**

====================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento nun tute ĝisdata ĝis 2018-14. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj, klingonuloj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.